

LA PONTO

Dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 2, N-ro 1 (5) : januaro-februaro 2009
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@skynet.be

Redaktore

Karaj Gesamideanoj,

Al ĉiuj legantoj de la revueto 'La Ponto', kaj speciale al la membroj de LEA, mi deziras, nome de la estraro de LEA kaj en mia persona nomo, feliĉan kaj prosperan novan jaron. Pli bone konatiĝu, kresku kaj plifortiĝu ankaŭ en la jaro 2009-a Esperantio, la virtuala lando de paco, samrajteco, amikeco, justeco kaj solidareco inter ĉiuj popoloj, kaj malaperu ĉia formo de hegemoniismo, neokoloniismo kaj imperiismo, ĉu ekonomia, ĉu politika. Jes, tio sonas iom naŭva kaj utopiisma, ĉar kvankam tiu idealo verŝajne ne estas atingebla, la homoj ne povas ne strebi al pli bona mondo por la feliĉo de ĉiuj teranoj, Tio ankaŭ estas parto de nia heredaĵo de la malgranda granda D-ro Zamenhof, kiu kredis, ke la prudento de la homoj fine venkos ĉiujn formojn de nacia egoismo kaj mallarĝeco. Ni do optimisme rigardu al la estonteco malgraŭ ĉiuj maltrankviligaj novaĵoj kaj antaŭdiroj.

Ni sendis la 4-an numeron de nia periodaĵo al 65 esperantistoj en Belgio kaj (al kelkaj) en Nederlando. Ĝi estas nur modesta kaj mal-dika, kaj ĝuste tial ni esperas, ke vi trovas la tempon legi ĝin. Ankaŭ nun ni deziras al vi agrablan legadon!

Jan Doumen

Komunikoj de UEA

(Mededelingen van de EWO)

1. La Institucio Hodler 40-jariĝis!

(Het Hodler-Instituut werd 40 jaar!)

Ĉar la membrotizoj ne sufiĉis al UEA, kiu ricevas nenian subvencion, por funkcii sen deficitaj, ĝi startigis kampanjon en oktobro 1968 por kolekti kapitalon, kies rento liveru al ĝi ekstrajn monrimedojn. Tial oni fondis la Institucion Hodler. La nuna prezidanto Grégoire Martens eniris la estraron en 1970 kaj sukcedis en 1986 al E.L.M. Wensing, la unua prezidanto. En la estraro membras krome

Ans Bakker-ten Hage, Renato Corsetti, Ivo Durwael kaj Ilja De Coster. Administranto estas Pasquale Zapelli. La ĉefa havaĵo de la Institucio estas la Esperanto-domo en Antverpeno, Frankrijklei 140, akirita en 1980 kaj luata de la Flandra Esperanto-Ligo kaj la antverpena klubo 'La Verda Stelo'. Ĉi-jare la Institucio aljuĝis subvenciojn je la suma valoro de 9.200 eŭroj. La plej grandan subtenon – 5000 eŭrojn – ricevis la Fondaĵo Canuto.

Se vi deziras prunti aŭ donaci monon al la Institucio Hodler, bonvolu kontakti la Centran Oficejon de UEA por pli detalaj informoj.

(Laŭ gazetara komuniko de UEA)

La 94-a Universala Kongreso de Esperanto 2009 okazos ĉi-jare en Bjalistoko, la urbo kie antaŭ baldaŭ 150 jaroj naskiĝis D-ro Zamenhof. Tiumaniere la urbestro kaj urbestro volas honori la grandan filon de sia urbo. La ĉefa kongresejo estos la Bjalistoka Politekniko. Apud ĝi estos starigitaj tendego funkcia kiel salono Zamenhof kaj gastronomia tendo kun malmultekostaj manĝaĵoj. La ĉefa flughaveno por atingi Bjalistokon estas tiu de Varsovio, de kie aŭtobusoj rekte veturas al la kongresurbo. Estas ankaŭ rekta trajnkonekto, kiu en 2,5 horoj atingas Bjalistokon. La konstanta adreso estas, kiel ĉiam, la Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Roterdamo. Tel. +31 10 436 1044 - Fakso +31 10 436 1751.

Retadreso: kongresoj@co.uea.org

http://www.uea.org/kongresoj/uk_2009.html

2. Uzu la interretan Jarlibron!

(Gebruik het internet-jaarboek!)

La 23-an de oktobro 2008 jam 1887 individuaj membroj de UEA – proksimume triono de la tuta nombro – uzis la interretan Jarlibron, kies plej evidenta avantaĝo estas ĝia konstanta ĝisdateco. Vi ne nur povas konsulti la kutimajn informojn konatajn el la klasika Jarlibro, sed ankaŭ rekte skribi al la retadres-havaj delegitoj, komitatanoj, estraranoj, perantoj, funkciuloj de UEA, TEJO kaj aliaj asocioj, alklakante la tiucelan butonon ĉe la koncerna nomo. Vi ankaŭ povas kontroli viajn personajn donitaĵojn kaj eĉ korekti ilin alklakante butonon, kiu malfermas formularon por tio. Tiuj kies membrotizoj rajtigas je

ricevo de la revuo *Esperanto*, povas pere de la reta Jarlibro jam legi kaj elŝuti ĝian plej novan numeron antaŭ la apero de ĝia papera versio, same kiel ĉiujn malnovajn numerojn ekde 2004. Junaj membroj povas fari la samon por *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*. Por utiligi la retan Jarlibron necesas unue registriĝi kiel uzanto ĉe la adreso <http://reto.uea.org>.

(*Laŭ gazetara komuniko de UEA*)

Novajoj el Esperantio

Nederlando. – *Ĉeĥa maristo dronis.*

En la nederland-limburga komunumo Heel apud la pitoreska urbeto Thorn iu maristo dronis en kanalo pro lingva problemo. La droninta estis ĉeĥo, laboranta sur germana boato. Franca maristo vidis, kiel li subite falis transranden kaj troviĝis en grava embaraso. La franco klopodis alarmi la kluziston, sed tiu ĉi tute ne komprenis lin, ĉar la franco povis esprimi sin nur en sia gepatra lingvo. Nur duonhoron poste fariĝis klare, kio okazis. Pro tio la serĉkampanjo suferis grandan kaj fatalan malfruecon. La plongistoj de la loka fajrobrigado trovis nur post horo la kadavron de la droninta maristo.

(*L.R., Het Belang van Limburg*)

Italio. – *Filmo farata en Esperanto.*

La 8-an, 9-an kaj 10-an de novembro, en kvar diversaj lokoj de la komunumo San Giuliano Terme, en la provinco Pisa, oni filmos en la internacia lingvo la spektaklon *Doktoro Esperanto* de kaj kun Mario Migliucci [miljuĉi]. La rezulta DVD estos poste dublita en pluraj lingvoj (laŭplane 25), kaj prezentita premiere dum la UK en Bjalistoko venontjare. Parto de la teatraĵo jam estis spektebla dum la UK en Roterdamo. Certe ĉiuj esperantistoj avide atendas la aperon de la DVD!

(*Bruĉjo Kasini*)

Pollando 1. – *Bjalistoka KD elsutebla.*

Interaktiva KD kun la simpla titolo *Esperanto* aperis la 10-an de septembro 2008 kiel senpaga aldonaĵo al la pola ĵurnalo *Gazeta Wyborcza* (eldonkvanto: 364.000 ekzempleroj). Ĝian produktadon financis la urbo Bjalistoko.

Per tiu KD oni promenas tra fabela virtuala Bjalistoko kaj vizitas plurajn konstruaĵojn de la urbo: Lernejo (Esperanto-kursoj), Kinejo (ses filmoj pri Esperanto), Muzikejo (kantoj en Esperanto), Gazetgiĉeto (kelkaj gravaj Esperanto-gazetoj), Esperanto-muzeo

(informoj pri Zamenhof, Esperanto-aranĝoj), Biblioteko (famaj verkoj en Esperanto)... La vizitantojn de la urbo bonvenigas en la urbodomo la urbestro s-ro Tadeusz Truskolaski, kiu salutas ilin en la pola kaj Esperanto).

1. Elŝutu la du pakaĵojn (*esperanto.part1.exe* kaj *esperanto.part2.rar*), kiuj enhavas la dosierojn de la lumdisko *Esperanto*:

<http://www.senspace.pl/file/KtdcNKb4/rediraHR0cDovL3NMDIxLnNlbnRzcGFjZS5wbC9maWx> kaj

<http://www.senspace.pl/fil/RLRae9f/rediraHR0cDovL3N2MDAzLnNlbnRzeGFjZS5wbC9maWx>.

Se aperas pollingva paĝo, alklaku la dosierojn *esperanto.part1.exe*, resp. *esperanto.part2.rar*. Se la supra ligo ne estas rekte alklakebla, aŭ se via retpoŝta programo pro longeco rompas ĝin en du liniojn, kopiu la tuton (seninterrompe) sur la adreslinion de via krozo.

2. En via komputilo metu la du suprajn elŝutitajn dosierojn en la saman dosierujon!

3. Startigu la pakaĵon *esperanto.part1.exe* kaj poste alklaku la butonon *Instalu*, kiu troviĝas en la malsupra parto de la aperonta fenestreto. Post tio la programo mem kreas dosierujon *Esperanto* kaj la enhavo de la elŝutitaj pakaĵoj estos malpakita en ĝin.

4. La elpakitan Esperanto-programon oni povas lanĉi per *start.exe* (en Vindozo), aŭ per *start.app* (en Makintoŝo) aŭ *start.html* (en Linukso aŭ alia mastrumsistemo).

5. Post la sukcesa malpakado de la dosieroj oni povas forviŝi la elŝutitajn du pakaĵdosierojn. La internan enhavon de la tiel kreita dosierujo *Esperanto* oni povas poste konservi sur laserdisko. (*Szilvási László*)

Pollando 2. – *Hospitalo monumento.*

Pasis 20 jaroj depost la tago, kiam oni solene nomis la Porinfanan Klinikon Hospitalon Hospitalo Ludoviko Zamenhof. “La ideo nakiĝis en julio 1987,” rakontas Maciej Kacsmarski, la unua direktoro de la hospitalo kaj iniciatinto de la konstanta ligo de la hospitalo kun Esperanto. “Al Bjalistoko venis granda grupo da partoprenantoj de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Varsovio. Dum la solenaĵo ĉe la Zamenhof-monumento oni anoncis la projekton konstrui Mondan Esperanto-Centron en Bjalistoko. Tiu ĉi cirkonstanco kaŭzis, ke mi opiniis, ke la nomumo de la hospitalo, kiu estis ĵus konstruita, Hospitalo Ludoviko Zamenhof, estas ĝusta paŝo. Baldaŭ poste la senato de la

Bjalistoka Medicina Akademio unuanime akceptis tiun rezolucion.”

En la hospitalo estas Esperanto-ĉambro kun impona busto de Ludoviko Zamenhof kaj konstanta ekspozicio de Esperanto-literaturo kiel la Unua Libro de la Lingvo Internacia (represita) – la unua lernolibro de Esperanto, Esperanto-versioj de romanoj kiel “La Faraono”, “Tra dezerto kaj praarbaro” kaj ekzempleroj de la revuo “Esperanto”. Tiel oni sukcesis krei en la hospitalo edukon Esperanto-centron por kuracistoj kaj medicinistoj.

(*Bonhumora Zamenhofano*)

Francio. – Interrete troveblaj estas diversaj raportoj, videoj kaj fotoj pri kunveno okazinta en la pariza sidejo de Unesko la 15-an de decembro 2008 memore al la 150-a datreveno de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof (1859-2009). Inter la ĉeestantoj estis S-rino Maria Wodzyńska-Walicka, ambasadorino de Pollando, S-rino Ina Marčiulionytė, ambasadorino de Litovio, S-ro Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de Lejzer Ludwik Zamenhof. Uneskon reprezentis S-ro Mauro Rossi (sekcio de la kreaĵ industrioj por disvolviĝo). Prelegis S-ino Henriette Walter, emerita profesorino pri lingvistiko en la Universitato de Alta Bretonio.

(*Henri Masson*)

Kiel lerni lingvojn alimaniere

(*Hoe talen leren op een andere manier*)

Esperanto estas ne nur elstara interreta komunikilo, kiu havas eksterordinarajn kvalitojn, sed ĝi ankaŭ montriĝas efika pedagogia rimedo, precipe por tiuj kiuj ekspluatas ĝian propedeŭtikan valoron ĉe la lernado de fremdaj lingvoj. Pluraj pedagogiaj eksperimentoj faritaj en diversaj landoj pravas tion. Se kelkaj el ili pekas pro amatoreco, aliaj estis entreprenitaj kun scienca rigoro de la doktoroj profesoroj I. Szerdahelyi de la Universitato Eötvös Lorand de Budapeŝto kaj Helmut Frank, direktoro de la Cibernetika Instituto de la Universitato de Paderborn. Multaj artikoloj estis dediĉitaj al tiu ĉi lasta eksperimento, kiuj okazis inter 1975 kaj 1982 kun partopreno de ĉirkaŭ 600 germanaj gelerantoj. La rezultoj montras, ke la nivelo de la infanoj, kiuj sekvis dum du jaroj la kurson de Esperanto kiel *orientigan lingvistikan kurson* estis mezume pli alta ol tiu de iliaj kunlernantoj en kvar branĉoj: geografio, matematiko,

gepatra lingvo (germana) kaj fremda lingvo (angla), kie la diferenco estis plej konstatabla.

Kiel ekspliki tion? Se Esperanto aperas elstara saltotabulo por la lernado de ia fremda lingvo, tion ĝi ŝuldas interalie al:

a) sia internacia vortaro, kies radikoj estis pruntitaj de la latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj lingvoj;

b) siaj karakteristikoj, similaj al tiuj de la aglutinaj lingvoj (ekz. la turka, japana, hungara) kaj la tiel nomataj izolaj lingvoj (ekz. la ĉina, malagasa);

c) la supleco de sia frazostrukturo kiun donas al ĝi la uzo de akuzativo, tiel ke la lernantoj nesenteble lernas uzi aliajn strukturojn sen esti senĉese bremsataj, kiam ili sekvas sian naturan impulson, kiu konsistas el imitado de la gepatra lingvo.

Tio parte eksplikas la fakton, ke la infanoj, kiuj studis Esperanton kiel unuan fremdan lingvon, pli facile kuraĝas paroli alian lingvon, pli nature ol la aliaj, ĉar ili venkis la psiĥologian barieron estiĝintan el la timo fari erarojn kaj tiel ridindigi sin.

Estas same tiom da punktoj kiuj pledas por enkonduko de Esperanto en niajn lernejojn. Sed ankoraŭ multaj senfondaj antaŭjuĝoj malhelpas, ke niaj pedagogoj malfermu kaj objekte pristudu tiun dosieron, dum paradokse oni daŭre paroladas pri komunikado kaj serĉadas la lingvistikan panaceon !

(*Germain Pirlot*)

Lingvo de espero (Taal van de hoop)

Por eviti ĉiujn militojn Wim de Bie kaj mi mem verkis kaj prezentis en 1971 por la nederlanda televidprogramo Teleac kurson de Esperanto, en kiu ni nomiĝis *Korneljo kaj Vilhelmo*.

Vilhelmo loĝis sur insuleto, kiun ni nomis Mop. Ĝi estis nur 5 m² vasta kaj estis farita el ŝaŭmplasto. Iutage Korneljo alflosis. Vilhelmo kaj li devis inventi novan lingvon en dudek lecionoj por povi supervivi. Memkompreneble tiu lingvo estis Esperanto.

De teĥnika vidpunkto la verkado kaj aktorado de tiu kurso estis la plej malfacila tasko kiun ni iam plenumis. Kiel oni devis skribi por la tria serio plaĉan kaj instrupovan scenon sen uzi la akuzativon en la dialogo ? Ĉar la kvaran kazon la gelernantoj ricevis hejme nur post la sepa leciono. Sed ni ne faris tion vane, ĉar ni ankoraŭ nun parolas la lingvon.

Oni ĉiam iomete mokas pri tiu artefarita Esperanto. Ĝi tamen estas klara, simpla lingvo,

kiun oni povas rapide lerni, kun simplaj reguloj kaj tute sen gramatikaj esceptoj. Sed Esperanto estas konsiderata kiel hobiaĵo por mondfremdaj pacifistoj, kiuj kompreneble surhavas kaprinlanajn ŝtrumpetojn kaj sur la roverso de sia ripvelura laboristjaketo rompitan fusilon.

Nia kurso atingis ĉirkaŭ 60.000 partoprenantojn, sed mi ne havas la impreson, ke ili poste transdonis la lernitaĵojn al siaj infanoj.

La disvastigo de Esperanto tamen spertas nenian kontraŭan agadon flanke de la aŭtoritatoj. En norda Ameriko kaj en Afriko la lingvo estas apenaŭ parolata, same kiel en la islamaj landoj.

Mi mem diris Esperantan frazon lastfoje en 1992, kiam mi ne povis rezisti la tenton alparoli en la pariza metroo viglan okdek-aĝulon, kiun mi rekonis kiel esperantiston per verda stelo sur lia kamelhara palto.

Mi do demandis: “Ĉu vi parolas la internacian lingvon Esperanto?” La viro renversiĝis pro emocio. Li havis vaskan ĉapon sur la kapo kaj portis du valizetojn. En unu estis ukulelo, kaj la alia, kiun li malfermis antaŭ mi sur benketo en la haltejo Les Halles, enhavis grandan nombron da pamfletoj pri trotskismo, makrobiotiko kaj naturismo.

Mi ricevis ĉirkaŭ dudek broŝurojn, kiujn mi devis distribui en Nederlando, kaj kun la promeso, ke ni ambaŭ engaĝiĝos per ĉiuj fortoj por mondopaco, ni adiaŭis lin por ĉiam.

En la nuna situacio mi povus ankoraŭ fari jenon: subtenate de kelkaj bone nederlanda-parolantaj araboj, ni transmetos Esperanton en la araban skribon.

Ĉar en 1971 ni ankoraŭ ne disponis pri videomagnetoskopo, kaj ĉar la elsendaĵoj registritaj sur AMPEX-bendoj estis ĉiuj forviŝitaj por povi reuzi la bendojn, eĉ ne sekundo de la materialo de la insulo Mop plu ekzistas. Sed mi ankoraŭ havas ĉiujn skribitajn tekstojn, du longludajn diskojn, kiuj apartenas al la kurso, same kiel ambaŭ tekstlibrojn.

Tiam ni igas reludi la kurson far araba kaj usona aktoroj. Poste la kurso estos premiere elsendita de la belga kaj nederlanda televido kun subteno de la sponsoroj IKV, Pax Christi, Unesko kaj Amnestio Internacio.

Bone rigardinte liajn fotojn kaj televid-elpaŝojn, mi kredas, ke Abou Jahjah povus ludi kun granda sukceso la rolon de Korneljo. Por la rolo de Vilhelmo ni petus la plej tutkoran malamanton de George W. Bush, Philip Seymour Hoffman. Sukceso garantita!

(Kees van Kooten)

Socia-psiĥologia strukturo de la esperantoparolanta komunumo *(Sociaal-psychologische structuur van de Esperantosprekende gemeenschap)*

Mia referaĵo apogas sin precipe sur la rezultatojn de sociologia enketo kiun mi okazigis en la parolkomunumo de la esperantistoj, kaj la induktivan sciencan metodon. Per tiu enketo mi deziris ekscii iom pli pri la socia-psiĥologia strukturo de tiu parolkomunumo, kvankam oni devas esti tre singarda dum la interpretado de la faktoj. Okazigo de tia enketo ne necese signifas, ke oni ricevas objektivan bildon de la tuta Esperanto-komunumo, ĉar la celo de tiu enketo ne estis la pridemandado de membroj de esperanto-organizaĵoj, kiuj konsistigas la formalan strukturon de la Esperanto-movado. Precipe interesis min la individuo, la esperantisto mem. En sociologio oni kelkfoje nomas tiun aliron “la psiĥologio de la individuo”. Tiu ŝajnas kontraŭdiro, ĉar sociologio okupiĝas per grupoj, sed oni povas ankaŭ analizi la ĝeneralojn karakterizaĵojn de grupo aŭ la manieron, kiel la grupanoj komprenas tiun apartenon al grupo. Tiun aliron mi praktikis. Cetere mi opinias, ke ankaŭ la psikologia faktoro ĝenerale ludas gravan rolon en sociaj grupoj.

Tial, flanke de la tipe sociologiaj demandoj en la enketo, ankaŭ estis testo por indentigi la respondantojn surbaze de siaj personaj karakterizaĵoj (modelo de Eiseneck). Por la prijuĝo de la rezultoj mi uzis skalon de +3 ĝis -3, ĉe kiuj 0 estas la mezuma valoro.

La kerna demando de la enketo estis: kiaj homoj estas la esperantistoj? Kaj pli specife: ĉu esperantistoj estas tiaj ĉar il estas esperantistoj, aŭ ĉu ili fariĝis esperantistoj, ĉar ili estas tiaj homoj? Alivorte: ĉu la karakterizaĵoj kiujn ni observas en la socia konduto de la esperantistoj, estiĝas sub la influo de la Esperanto-kulturo, aŭ inverse: ĉu pro tiuj karakterizaĵoj ili emis fariĝi esperantistoj kaj akcepti la Esperanto-kulturon? Esplori tiujn demandojn estas ambicia tasko, kiun ni ne povas tute plenumi, sed ni tamen provis.

La unua parto de la demandoj pritraktas socia-demografiajn variablojn, kiel sekson, rason, naskiĝaron, etnan grupon kaj ŝtatanecon. La celo de tiuj demandoj estis ekscii ion pri la socia moviĝemo de la esperantistoj. La demandoj estis metitaj el la postkuŝanta penso, ke la esperantistoj estas geografie pli moviĝemaj ol la mezuma

loĝantaro. Plue oni supozis, ke la esperantistoj havas pli fortan naciecan konscion, kio signifas, ke ili havas malpli da antaŭjuĝojn kaj do, danke al sia geografia moviĝemo, pli facile transloĝiĝas al alia lando kaj pli rapide eniras miksan geedziĝon aŭ rilaton. Tial estis ankaŭ demando pri la etna deveno de la patro, patrino, kaj similaj, kaj demando pri la gepatra lingvo.

Nun jen kelkaj ciferoj : ni ricevis la samajn rezultatojn kiel Peter Forster en sia libro “The Esperanto Movement”, nome 70% de la respondintoj estas viroj, kaj 30% virinoj. Multaj sociologiaj studoj efektive montras, ke viroj pli facile emas partopreni en sociaj movadoj.

Al la demando pri la raso multaj partoprenantoj rifuzis respondi. Verŝajne ĉar tio ne estas aferkoncerna temo por esperantisto.

Koncerne la aĝostrukturon, el la enketo evidentiĝas, ke la Esperanto-movado estas multe pli aĝa, ol ĝi devus esti. Estas tro malmulte da junuloj, kaj la meza generacio preskaŭ tute mankas, kio konsistigas problemon por la kontinueco de la movado. Klarigo de tiu fenomeno estas, ke edziĝo, gepatreco, kariero k.s. estas obstakloj por la Esperantistoj por aktiva partopreno en la Esperanto-movado. Alia konkludo estas, ke ĝi estas movado kun tro multaj gemaljunuloj, kio ne altiras junulojn.

Surpriza rezultato estas, ke 40% de la partoprenantoj respondis, ke ili apartenas al etna aŭ lingva minoritato, aŭ ke ili naskiĝis el miksegeedzeco. Ili nomis sin “valono, friso, skoto, kataluno” ktp.

Duono de la la esperantistoj estas ateistoj. El la alia duono la plej multaj estas protestantoj aŭ katolikoj. Ĝenerale la esperantistoj estis pli toleremaj pri religio, politikaj konfliktoj kaj samseksamo. Se rigardi la profesion, ni vidas, ke la esperantistoj plej ofte originas el la meza klaso, sed ĝenerale ili ricevis pli altan edukon ol la meza grupo de sia lando.

Koncerne la demandon pri la politikaj simpatioj, mi konstatis, ke 80% de la esperantistoj ne estas membro de politika partio, kaj se ili estas membroj, ili apartenas al la komunista partio (ĉirkaŭ 6%) aŭ la socialista partio. Politike ili simpatias precipe kun la modera maldekstro kaj la verduloj. Tre granda grupo tute ne interesiĝas pri politiko. La Esperanto-movado enhavas ankaŭ grandan nombron da nekonformistoj: vegetaranoj, reformistoj de ĉiuspecaj aferoj kaj homoj kun relative strangaj ideoj.

Multaj vegetaranoj ĉe tio estas maldekstruloj kaj radikaluloj.

La esperantistoj interesiĝas pri ĉiaj ajn lingvoj, kaj iliaj favorataj landoj estas Francio, [eksa] Jugoslavio, Svislando kaj Pollando. Landoj kiuj ne interesas ilin, estas Sudafriko, Irano kaj Albanio.

La plej ŝatataj politikistoj estas (en jena sekvo) : Mahatma Ghandi, Martin Luther King, Josip Broz Tito, Lenin kaj John F. Kennedy. Esperantistoj legas multajn gazetojn kaj revuojn, sed malmulte da literaturo.

(*Nikola Rašić*)

Eksterulino defendas Esperanton

(*Een buitenstaandster verdedigt Esperanto*)

Esperanto-entuziasmoj havas dikan haŭton. De kiam pola judo inventis la lingvon en 1887, esperante, ke ĝi disvastiĝos tra la tuta mondo, cinikuloj primokas ĝin kvazaŭ idealisman kulton por lingvaj stranguloj.

Tamen, por tiel ambicia kaj neverŝajna ideo, ĝi gajnis sian parton da konateco. Saddam Hussein sentis sin tiel minacata de ĝi, ke li forpelis la solan irakan Esperanto-instruiston dum sia tiraneca reĝimo. Kaj la miliardulo kaj bonfaranto George Soros dankas sian prospercon al tiu ideo: li malfideliĝis al la komunista Hungario dum la Universala Kongreso de Esperanto en Svislando en 1946.

Laŭ kreskanta nombro da entuziasmoj la plej glora tago de la lingvo ankoraŭ estas venonta. Kvankam nombroj estas malfacile havendaj, kaj tiuj disponeblaj ne estas fidindaj – UEA asertas, ke estas 8 milionoj da parolantoj –, la lingvo disvastiĝas en Azio, Suda Ameriko kaj Afriko. “Danke al la interreto ni vidas vastan kreskon da kompetentaj parolantoj en landoj kiel Ĉinio kaj Brazilo”, diras Prof. Humphrey Tonkin, de la Universitato de Hartford kaj eksprezidanto de UEA.

Efektive Esperanto ŝajnas perfekta por nia moderna tempo, kiam barieroj tra la mondo estas faligataj de la libera komerco, enmigrado kaj interreto, kaj kiam aktivuloj, hobiistoj kaj intelektuloj tra la tuta mondo interkomunikiĝas kiel neniam antaŭe. Malkiel la alia mondlingvo, Esperanto metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. La denaskaj angloparolantoj konsistigas nur 10% de la mondloĝantoj, sed ili atendas, ke ĉiuj aliaj transprenos ilian lingvon. “Ekzemple en Azio la homoj konscias pri la lingvoproblemo pro la multaj diversaj lingvoj,” diras Prof. John Wells de la Universitata Kolegio de Londono. “Kelkaj demandas sin, ĉu

ili uzu la anglan por pli vasta komunikado, aŭ ĉu ekzistas alia solvo.”

Komence Esperanto altiris multajn homojn pro la fakto, ke ĝi estas kvinfoje pli facila ol la angla kaj dekfoje pli facila ol la rusa. Onidire Lev Tolstoj lernis la lingvon en kvar horoj.

Sed ĉar la lingvo pli kaj pli populariĝis, ankaŭ la timo de la tiranecaj registoj kreskis. Hitler asertis, ke la judoj povus uzi ĝin por pli facile domini la mondon. Stalin, minacata de la ideo de mond vasta komunikado, sendis milojn da ili al la siberiaj gulagoj.

Nuntempe la eŭropaj Esperanto-parolantoj ŝajnas esti restaĵoj el la periodo de la malvarma milito, kvankam en Pollando kaj Hungario studentoj povas fariĝi filologiaj doktoroj en la lingvo. Multaj kredas, ke la populareco de la lingvo estas nutrata de la kreskanta malkontenteco pri la angla kiel lingvo de la monda komerco kaj internacia politiko. “Bush kaj Blair fariĝis la plej bonaj amikoj de Esperanto,” ŝercas Prof. Probal Dasgupto de la Universitato de Hyderabad (Hindio), nuna prezidanto de UEA. “La tutmondiĝo metis venton en niajn velojn, ebligante al la homoj interesiĝi pri Esperanto ne nur kiel lingvo, sed ankaŭ kiel socia ideo.”

En la hodiaŭa ŝrumpanta mondo la momento ne povus esti pli bone elektita.

(G. Brownell, “Newsweek International”)

Firefox en Esperanto

(*Firefox in het Esperanto*)

La oficiala versio de la populara, libera ret-naviga programo Firefox, foje nomata ‘Fajrovulpo’, nun ekzistas ankaŭ en Esperanto.

La unua versio de la traduko estis publikigita antaŭ unu jaro, kaj tiam ĝi estis distribuata kiel aldonaĵo, per kiu eblis kompletigi ajnalingvan version de Firefox. Por esperantigi la krosilon necesis unue havigi al si alilingvan version de Firefox kaj kromprogramon por ŝalti inter la diverslingvaj versioj de la krosilo.

Per la nuna versio Esperanto evidente eniros la oficialan liston de lingvo versioj, kaj la Esperanta traduko estos distribuata memstare. Tio grave simpligos la instaladon. Jam nun en la oficiala retejo de Firefox (vidu <http://www.mozilla.com/en-US/firefox/all-beta.html>) inter la diverslingvaj beta-versioj de Firefox 3.1 estas elŝutebla ankaŭ la esperantlingva traduko.

La Esperantan tradukon prilaboris teamo gvidata de Eduardo Trapani el Urugvajo, kiu havis densan kontakton kun alia projekto, la

tradukado de la ampleksa libera programaro OpenOffice.org. Ĝi grandparte sukcesis kunordigi la du tradukojn, tiel ke oni uzas la samajn terminojn en ambaŭ. Helpis ĉe tio ankaŭ la retejo de la projekto Komputeko.

(El ‘*Libera Folio*’)

Aktivajoj de LEA

(*Activiteiten van LEV*)

1. Pasintaj aktivajoj:

Ĵaŭdon, la 27-an de novembro:

Ses esperantistoj kuniĝis por ludi “boggle” kaj “pendumito”. An Olijslagers gvidis la ludojn. Por “boggle” ŝi skribis hazardan serion da literoj sur la tabulo, per kiuj la ludantoj devis formi kiel eble plej grandan nombron da diversaj Esperanto-vortoj. Kompreneble la tempo por fari tion estis limigita. Venkis tiu kiu skribis la plej longan liston da vortoj. Por la ludo “pendumito” An desegnis pendumilon. La ludantoj devis laŭvice diveni literon de Esperanto-vorto, de kiu An donis nur du literojn. Por ĉiu bone divenita litero ŝi forviŝis parton de la pendumilo. Por ĉiu malbona litero ŝi realdonis parton al la pendumilo kaj fine laŭgrade aldesegnis la pendumiton. Pendumito estis tiu ludanto kiu kompletigis la desegnaĵon.

Ĵaŭdon, la 18-an de decembro 2008:

Je la sepa vespere ses LEA-anoj trafis sin en la kafejo TORENHUIS en Peer por partopreni en la Zamenhoffest(en)o. Post la aperitivo ili sidiĝis ĉe longa festa tablo, kaj bela knabino servis al ili laŭvice:

- brokolokremsupon,
- meleagrofileon kun ĉampinjonsaŭco kaj legomoj de la sezono,
- hejmpreparitan glaciaĵon Baily en festglaseto.

La tuton ni surverŝis per bona ruĝa vino, per kiu Rik Leijskens regalis nin. Dankon, Rik! Nur An saĝe trinkis akvon. Je la deka – ĉar tiam oni fermis la kafejon –, post tre bongusta kaj agrabla manĝo, ni adiaŭis unuj la aliajn.

2. Venontaj aktivajoj:

Ĵaŭdon, la 29-an de januaro 2009:

Ben Indestege denove faris vojaĝon tra meza Eŭropo kaj venos denove rakonti al ni siajn spertojn kaj travivaĵojn. Li ne venos sola, sed lin akompanos pluraj amikoj. Komenco je 20h00.

Ĵaŭdon, la 26-an de februaro 2009:

Kvizo gvidota de Henri Schutters. Komenco je 20h00.